**Francilia esperanta federacio**

# Eksterordinara Ĝenerala Asembleo kaj Ordinara Ĝenerala Asembleo 2025

## ĜENERALAĴOJ

### PARTOPRENO

La ĝeneralaj asembleoj 2025 de la francilia federacio de esperanto okazas dimanĉon la 23an de marto je 10h10. Tiudate la asocio havas 96 membrojn. La ĜAj okazas mikse: kaj rete, kaj surloke en la sidejo.

Partoprenas: 1 rete, 18 en la sidejo, entute 19 membroj.

Elcento de ĉeesto en la ĜAj: 20%.

### BALOTO

La membroj povis voĉdoni rete per la retejo balotilo.org, krom 3 membroj, kiuj povis voĉdoni poŝte. La voĉdonado finiĝis la 22an de marto je 00h, t.e. la 21an vespere.

Ricevintoj de balotilo: 93 rete kaj 3 poŝte, entute 96.

Voĉdonintoj: 58 rete kaj 0 poŝte, entute 58.

Elcento de partopreno en la baloto: 60 %

## EKSTERORDINARA ĜENERALA ASEMBLEO (EĜA)

### REZULTO DE LA VOĈDONADO

La celo de la baloto estis (mal)aprobi ŝanĝon en la statuto de la asocio. Por esti aprobita, ŝanĝo de la statuto devas ricevi almenaŭ tri kvinonon (3/5) de la voĉoj (tio estas 60%), ĉi-okaze ricevi almenaŭ 35 voĉojn.

La proponita ŝanĝo temas pri la minimuma nombro de komitatanoj. Nun la minimuma nombro estas 9, la propono estas ŝanĝi la minimuman nombron al 6.

Aprobo de la ŝanĝo: 39 aprobas, 7 malaprobas, 12 sindetenas. Konklude la ŝanĝo estas aprobita.

La EĜA finiĝas je la 10h20. Tuj sekvas la OĜA.

## ORDINARA ĜENERALA ASEMBLEO (OĜA)

### REZULTOJ DE LA VOĈDONADO

La celo de la baloto estis (mal)aprobi la agadraporton 2023-2024 kaj la financan raporton 2024, kaj elekti novan komitaton. La du raportoj legeblas en nia retejo ĉe https://esperanto.paris/membro-kunvenoj

Aprobo de la financa raporto: 48 aprobas, 0 malaprobas, 10 sindetenas. Konklude la financa raporto estas aprobita.

Aprobo de la agadraporto: 52 aprobas, 0 malaprobas, 6 sindetenas. Konklude la agadraporto estas aprobita.

Notu ke la financa raporto koncernas la jaron 2024 de januaro ĝis decembro. La agadraporto koncernas jaron de la lasta ĜA al ĉi tiu ĜA, tio estas de marto al marto.

Elekto de nova komitato:

La komitato enhavu inter 9 kaj 15 membrojn. (Eĉ en la okazo, ke la ĵusa EĜA ŝanĝis la minimuman nombron de 9 al 6, tiu ŝanĝo ne povas validi por la ĉi-jara baloto, ĉar la voĉdonintoj ne sciis tion kiam ili voĉdonis).

Cetere, la kandidato devas esti aprobita de almenaŭ duono (1/2) de la voĉdonintoj, ĉi-okaze ricevi almenaŭ 29 voĉojn.

- Raymonde Coquisart: 48 voĉoj
- Romain Curis: 43 voĉoj
- Pierre Gauthier: 48 voĉoj
- Pascal Hébert: 36 voĉoj
- Didier Janot: 45 voĉoj
- Aleks Kadar: 44 voĉoj
- Aurélien Lestage: 48 voĉoj
- François Lo Jacomo: 48 voĉoj
- Laure Patas d'Illiers: 51 voĉoj
- Viktoro Simonnet: 46 voĉoj
- Guillaume Vera-Navas: 41 voĉoj

Konklude, ĉiuj kandidatoj estas elektitaj. Gratulon al la nova komitato.

La nova komitato elektos en si mem novan estraron dum sia venonta komitatkunsido, la 28an de marto, je la 7a ptm kaj duono.

Ĉiuj membroj povas sendi mesaĝojn al la komitato per la jena retpoŝtadreso:

komitato-francilio @ googlegroups.com

# EVENTOJ DE LA PASINTA JARO

La eventoj de la pasinta jaro estas priskribitaj en la agadraporto. Ilin prezentas la prezidanto kaj la prizorgantaj komitatanoj. La komitato petas de la partoprenantoj iliajn rimarkojn pri la organizitaj eventoj.

## Fermo de Esperanto 94

La afero estas prizorgata, la fermo verŝajne okazos en 2025. Post la fermo, ĝiaj havaĵoj (arĥivoj, mono, objektoj) devos iri al esperantaj asocioj ĉefe en Francilio.

# FINANCOJ

La financa raporto estas prezentata de la kasisto.

Granda elspezo estis la kantisto por la ZamFesto. La saldo estas pozitiva. La asocio posedas entute 27.000 eŭrojn.

# AGADPLANO POR LA VENONTA JARO

La planoj estas prezentitaj de la prezidanto kaj de la prizorgantoj. Ili petas de la partoprenantoj esprimi iliajn rimarkojn, sugestojn kaj proponi ilian helpon.

## Junulara babilrondo

Prizorgota de Guillaume Demeyère.

## Helpo por salonoj

La asocio prizorgas budon dum multaj eventoj: Matematikaj ludoj en junio, Homara Festo en septembro, Salono de la edukado, ktp. Ni bezonas helpon por deĵori. Bonvolemuloj proponu sin kiam ni informas.

### Prelegturneoj

Inter la 12-a kaj 14-a de majo la kuba paro Miguel Angel Gonzales Alfonso kaj Daimi Deval estos en Parizo.

### Esperanto-Kafejo

Nova organizanto bezonatas. Cyrille Poullet kaj Ludivine Delnatte proponis sin teame.

### ZamFesto

Ĝi okazas en decembro. Lastjare ĝi estis organizita kun 2 aliaj asocioj, la fervojistoj kaj la pariza grupo de SAT-Amikaro. En 2025, Raymonde denove organizos kun la 2 asocioj.

### Kreado de filmetoj

Ni spektis filmeton kiu estis improvizita okaze de Esperanto-kafejo, muntita de Régis, filmita de Viktoro. Interesatoj povos partopreni estontajn filmetojn.

### Ordigo de la francaj esperantaj arĥivoj

Projekto kun *Les Archives nationales*, prezentita dum la lastjara ĜA. La unua rikolto, lastjare amasata, estos ordigita en Campus Condorcet dum pluraj tagoj (de la 4a de aprilo ĝis la 11a de aprilo). Helpo de bonvolemuloj estas petata.

Arĥivoj povas esti proponataj al tiu projekto.

Kontaktu Régis (lucien2022 @ proton.me) aŭ senpere : Claire Mousset-Déclas : esperanto.komodo @ gmail.com.

### Diskutrondoj

Raymonde daŭre prizorgos la diskutrondojn sabate posttagmeze inter la 14a30 kaj la 16a30. Datoj planitaj ĝis la someraj ferioj : 26-a de aprilo, 24-a de majo kaj 21-a de junio. Temo de la aprila rondo : Radioj en Esperanto.

## KONKLUDO

La tagordo estas fintraktita. La prezidanto dankas ĉiujn partoprenantojn. La ordinara ĝenerala asembleo finiĝas je 12h12.